
# Programo de KKPS

| Horo | Salono | Bovidejo | Ekstere |
|---|---|---|---|
| | | **Vendredo** | |
| 14:00 | Akceptiĝo kaj preparoj | | Antaŭekskurso Amsterdamo |
| 19:30 | Vespermanĝo | | |
| 21:30 | Halovina festo | | |
| 23:00 | | Homlupa ludo | |
| | | **Sabato** | |
| 8:30 | Matenmanĝo | | |
| 10:00 | BEMI | | |
| 11:00 | Kunlaboraj ludoj | Lucidaj sonĝoj | |
| 12:00 | Verdaj skoltoj | Asembleo NEJ | |
| 13:00 | Tagmanĝo | | |
| 14:30 | Purigado | | Promenado al Beverweert |
| 15:00 | Ludoj | Kiel vojaĝi al Brazila IJK | |
| 16:00 | Faks-murd-ludo | | |
| 18:00 | Subtekstigado de filmoj | Kunsido pri belga movado | |
| 19:00 | Kiel iĝi hundo? | Diskutrondo: Eternaj junuloj | |
| 19:30 | Vespermanĝo | | |
| 21:30 | Koncerto ĴeLe | | |
| 23:00 | Trinkludoj | | |
| | | **Dimanĉo** | |
| 8:30 | Matenmanĝo | | |
| 10:00 | Kiel agi libere? | | |
| 11:00 | | | Urba ludo en Utrecht |
| 12:00 | Tagmanĝo | | |
| 13:00 | Purigado | Purigado | Manĝi sandviĉojn |



# Pos-Amiko

**Aŭtuno 2013, Numero 6**

## INDEKSO:

1. Koko Poso savas JES

1. Sportturniro honore al IJK

2. Ukuleloj reaperis

2. Novaj loĝkategorioj malfermas novajn eblecojn


2. TEJO malfermas komisionon por IJK sur Marso

3. El la tombo de Zombenhof

3. Horoskopo

3. Konkurso

4. EVENTOJ



## Koko Poso savas JES

Antaŭ kelkaj semajnoj publikiĝis la aliĝilo de JES 2013/14. Multaj esperantistoj rimarkis pri ĝia malfrueco (malkiel la aliĝilo de KKPS), sed malmultaj scias la kialon de tio. Finfine la Pos-Amiko malkovras al vi la misteron.

En la komenco de septembro Koko Poso telefonis al JES-organizanto, kiu volas resti anonima, kun la demando, kie estas la aliĝilo: "Saluton JES-organizo, ĉi tie Koko Poso. Ĉu vi planas baldaŭ aperigi aliĝilon de JES?"

"Koko Poso, la mondfama ĵurnalisto, kia honoro! Ni jam aperigis la aliĝilon en majo. Ĉu estas iu problemo?"

"Sed kie ĝi estas do?"

Mallonge post tio evidentiĝis, ke la aliĝilo ja ekzistas, sed por protekti kontraŭ usona spionado ĝi estis bone kaŝita. Evidente tro bone, ĉar neniu povis vidi ĝin. Finfine la JES-organizo sukcesis retrovi la aliĝilon kaj videbligi ĝin.

"Ni jam miris, kial ankoraŭ neniu aliĝis. Ĝis nun ni supozis, ke eble kulpas la loko en la mezo de nenio aŭ la kreskanta populareco de KKPS. Ni ĝojas, ke nun funkcias la aliĝilo kaj homoj jam aliĝis. Dankon, Koko Poso!"

## Sportturniro honore al IJK

La brazila registaro, celante doni atenton la la Internacia Junulara Kongreso okazonta en Fortalezo en julio 2014, decidis organizi tuj antaŭ ĝi piedpilkan turniron, en kiu partoprenos 32 naciaj teamoj. Ankaŭ neesperantistoj estas invitataj spekti la ludojn.

## Ukuleloj reaperis

Tre ĝojiga novaĵo estiĝis post la someraranĝa sezono: pluraj ukuleloj estis ekviditaj. Dum la lastaj jardekoj ukuleloj fariĝis ĉiam malpli oftaj kaj dum pluraj jaroj oni eĉ ilin taksis estingitaj.

Ĉi tiun someron pluraj ekzempleroj de ukuleloj estis ekviditaj en Italujo, Amikejo kaj Israelo, ĝuste proksime al lokoj kie, memkompreneble, troviĝis esperantistoj, kiuj ekĝojis je la aŭdo de ties melodiaj sonoj.

MB M, eksa estrarano de TEJO pri eksteraj rilatoj asertis: “Tio pruvas la ekstreman sentemon de esperantistoj pri la mondproblemoj kaj la protektado de ĉia diverseco (ne nur lingva), kio efektiviĝis en samideana agado malestinga. La ukulelreapero dumesperantaranĝa estas unu el la plej fierindaj atingoj de nia movado, kio ja certe portos amason da prestiĝo kaj konsekvenca intereso ankaŭ al nia lingvo kaj malfermas la pordojn al longdaŭra kunlaboro kun la ukulelamikaro.”

## Novaj loĝkategorioj malfermas novajn eblecojn

Esperantaj renkontiĝoj tradicie konas tri loĝkategoriojn: en ĉambro, en amasloĝejo aŭ memstare, al kiuj dum la somero aldoniĝas tendumado. Escepto estas la maljunulaj kongresoj, kiuj konas nur la kategorion “ni fajfas pri via monujo, pagu hotelon”. Sed ĉi-somero la komunumo estis skuita de novaĵo el Amikejo: la amasluksejo. Tiu ĉi kategorio troviĝas meze inter ĉambro kaj amasloĝejo kaj celas homojn, kiuj ne bezonas grandan lukson, sed tamen ne volas mem kunporti matracon kaj dormsakon. Nun la organiza teamo de FESTO esploras pri novaj kategorioj por la sekva festivalo. Jen ekskluzive por legantoj de Pos-Amiko la nunaj proponoj:

Vaganto – ne disponas pri propra dormloko, sed ĉiuvespere trovas mem kundormanton.

Ebriulo – por ili estas rezervitaj kelkaj dormlokoj sub la tabloj de la trinkejo.

Amastendumanto – kombinas la varmon de ene kun privateco, tendumante en amasloĝejo.

Tagdormanto – tiuj, kiuj festas dum la nokto, povas dumtage rabate dormi en lito de alia.

Nedormanto – ne dormas. La plej malmultekosta kategorio, por tiuj, kiuj volas nenion maltrafi.

## TEJO starigas komisonon por IJK sur Marso

Post konstato pri la malforto de la Marsa Esperanto-movado, kaj la granda potencialo tie, la estraro de TEJO decidis starigi komisionon “Marsa IJK”. La ĉefa celo de la komisiono estas esplori eblecojn organizi IJK-n sur la najbara planedo kaj proponi taŭgajn lokojn al la TEJO-estraro. La komisionon prezidas Michael Boris Mandirolo, estrarano pri Landa Agado. La komisiono ne havas striktan limdaton por sia agado. Ĉiuj membroj de TEJO estas invitataj aliĝi al la grupo.

**ANONCO:** eblas lui la ĉambreton Kolombejo por privataj celoj, 3★ por duonhoro.

## El la tombo de Zombenhof

La tagoj mallongiĝas, la folioj falas kaj la horloĝo ĵus moviĝis unu horon: estas aŭtuno! Alvenas nun du gravaj festoj, el kiuj unu mi amas, kaj la alian mi malamas.

La unua estas halovino, la nura momento en la jaro, kiam aspekti kiel zombio estas avantaĝo. Mi ŝatas la ornamaĵojn, la dolĉaĵojn, la kostumojn, kaj la gajajn vizaĝojn de infanoj dum la plej timiga festo de la jaro. Mi tre bedaŭras tial, ke mi ne povas viziti la grandan halovinan feston en Werkhoven ĉijare. Mia nuna stato ne permesas al mi vojaĝi tiom malproksime.

La alia festo, kiun mi malamas, estas Zamenhoftago. Jam pasintjare mi klare esprimis, ke mi ne ŝatas la feston, kaj consideras ĝin kontraŭa al la spirito de egaleco, kiun devus reprezenti Esperanto. Tamen mi ricevis jam kelkajn invitojn al festoj en decembro misuzantaj mian nomon.

Feliĉe nuntempe mi ankaŭ pli kaj pli ofte aŭdas voĉojn kontraŭajn, kaj kelkaj amikoj al mi donis originalajn konsilojn por eviti la Z-tagon: peti plian laboron de dunganto, tendumi en arbaro kun familio, aŭ bruligi la lokan klubejon semajnon antaŭe. Pro tio mi ekhavis la ideon lanĉi la konkurson, en kiuj vi povas mem sendi viajn plej bonajn ideojn.

*-Lazaro Zombenhof*

## La horoskopo

**Ŝafo:** Vi ricevos muzikdiskon donace. Bedaŭre ĝi estos de Manŭel.

**Taŭro:** Novembro estos tre bona monato por tondi nazharojn.

**Ĝemeloj:** Vi baldaŭ aliĝos al KKPS 2014.

**Kankro:** Vi estos murdita.

**Leono:** Konsideru amastendumi dum sekva renkontiĝo.

**Virgulino:** Post la trinkludoj vi ne plu estos.

**Pesilo:** Sub kostumo povas atendi vin surprizoj.

**Skorpio:** Viaj okulvitroj rompiĝos kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Aleks Kadar:** Vi finfine legos la Pos-Amikon.

**Sagitario:** Novembro estas tempo de ĥaoso, krom se vi venas al KKPS.

**Kaprikorno:** Feliĉe vi ne bezonas kostumon, ĉar via vizaĝo estas jam sufiĉe timiga.

**Akvisto:** Vi gajnos ekzakte unu ludon dum tiu ĉi semajnfino.

**Fiŝoj:** Ne pensu, ke post via longa vojaĝo vi povos frue ekdormi dum KKPS!

## KONKURSO: Alternativo por Zamenhoftago

Sendu viajn ideojn, rakontojn aŭ bildojn pri kiel plej bone eviti la tradiciajn stultaĵojn de Zamenhoftago al kkps.klacxkunveno@gmail.com antaŭ la 20-a de decembro. La plej bonaj kontribuoj aperos en la sekva Pos-Amiko!